

Lum' krepuska levas sin

(originale verkita en Esperanto)

1. Lum' kre - pus - ka le - vas sin
Ĝo - je, Di', mi be - nas Vin
en ĉi fru - ma - te - na hor'.
kun dank - em', el vi - gla kor'.
Dan - kon! Vi - va - das mi!
Jen no - va tag!
No - va vi - vo - e - ner - gi,
no - va ŝanc' por bo - na ag',
no - va ŝanc' — por bo - na ag'.

2. Floroj apertigas sin
kaj sin turnas al la lum'.
Mi malferm-anime Vin
kontempladas, Dia Sun'.
Vi, Di', prilumu min
sur mia voĵ',
ĝis mi transe vidos Vin
por etern', en glor', kun ĝoj',
por etern', en glor', kun ĝoj'.

LUM' KREPUSKA LEVAS SIN • M kaj E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2024-08-19

Publikigita en *DIA REGNO* n-ro 4 (967) 2024, p. 96